12e JAARGANG No. 6 VERSCHIJNT MAANDELIJKS 15 JUNI 1950

La Progresanto

REDACTIE-COMITÉ
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 2.— per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

SIMPLECO DE VORTOJ

Simpleco de stilo estas la ĉefa premiso por facile komprenebla teksto. Simpleco de stilo rezultas el diversaj faktoroj: logika rezono de l' skribanto, laŭorda frazkonstruo, ellaso de superfluaj frazelementoj, estetika aranĝo de la vortoj k.t.p. sed ĝi komenciĝas jam ĉe la frazelemento mem, ĉe la vorto.

Ni dediĉu nun iom da atento al la simpleco de la vorto.

Simpleco de la vorto povas konsisti en ĝia konateco kaj en ĝia formo. Ni konas la emon de multaj homoj traplekti siajn frazojn per multe da fremdaj vortoj. Tio imponas! Ĉe multaj homoj evidente regas ia neplene konsciata sento: ju malpli klaraj estas iliaj vortoj, des pli da respekto ili rikoltas. Kaj tiu fakto sendube ankaŭ kontribuas al la pezeco de stilo en kelkaj Esperantaj gazetoj, kaj al la misornamo per multaj neologismoj. Al sperta kaj inteligenta leganto tio impresas ridige. Sed komencantojn tio povas fortimigi, ĉar ili ne jam akiris la povon distingi inter bona kaj malbona stilo.

Ĉiu komprenas, ke Esperanto evoluas ankaŭ en sia vortriĉeco: ke por ĉiu nova ideo ni bezonas novan Esperantan vorton. Tio tamen ne signifas, ke ĉiun novan vorton ni blinde transprenu el aliaj lingvoj Se ni povas formi ĝin el jam ekzistantaj Esperantaj radikoj, ni faru tion, sed ne senbezonu kreu novaĵon, t.n. neologismon.

Sed ankaŭ laŭforme la vortoj estu simplaj, t.e. oni ne uzu tro longajn vortojn, nek vortojn kunmetitajn el tro multaj elementoj. Kaj en tiu ĉi rilato konvenas konsilo speciale al novaj esperantistoj.

Komence ni ĉiuj emas traduki vorton per vorto. Ni ne ŝatas lasi iun vorton netradukita, sed ankaŭ ne traduki unu vorton per du aŭ pli. Kaj tamen, tradukante en kiun ajn lingvon, ni devas konscii, ke ni pli ĝuste transmetas ideojn, ne vortojn. Se iu ideo en iu lingvo bezonas nur unu vorton, ĝi eble postulas en lingvo alia du, aŭ inverse. Ankaŭ Esperanton tio koncernas. Tamen, ĉar Esperanto ne estas „nature" estiĝinta lingvo, ĝi komence ne disponis pri fiksita normo por tuj repuŝi nekonvenajn vortformojn. Nur iom post iom estiĝis tradicio, en kiu simpleco, tuja kompreneblo kaj estetiko ludas rolon. Kaj tiuj faktoroj nun estas la principoj, laŭ kiuj ni formu niajn vortojn. Praktike tio signifas:

ke ĉiu traduko, kiu aspektas tro longa kaj ne estas unurigarde transvidebla, estu dividita en du, ekz. ne *propagandfolieto*, sed *propaganda folieto;*

ke en okazo de neceso oni intermetu prepozicion, anst. *parlamentbaloto: baloto por la parlamento;*

ke neeviteble longan kunmetaĵojn oni almenaŭ ŝajne dividu per interstreko: *Esperanto-instituto;*

ke oni nepre evitu sinsekvajn ĝenajn konsonantojn en unu vorto, ekz.: *helppeto, kelkkaze, radikgrupo,* sed dividu la vorton aŭ intermetu vokalon;

ke oni ne uzu tro da akuzativoj, sed klopodu jen kaj jen alterni ilin per prepoziciaj komplementoj.

Fine, ĉar konsiloj ne ligiĝas al reguloj, sed estiĝas el okazaj bezonoj, oni ĉiam klopodu uzi klarajn kaj mallongajn vortojn. Tri - kvar klaraj vortoj impresas pli agrable ol unu logike ĝusta vortmonstro.

G. J. D.

H. Kuijt.

In dit nummer geven wij weer eens een examentaak voor A-candidaten en overige belangstellenden; wij stellen de voortzetting van de behandeling der correlatieven dus uit tot het volgend nummer. Vertalingen zenden voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 6. Vertaal in Esperanto:

Onze Conversatie-avond.

1. Iedere Dinsdagavond om 8 uur komen wij bijeen in onze gezellige zaal.
2. Tot kwart over acht hebben wij de gelegenheid om contributie te betalen of een praatje te maken met d' een of andere vriend.
3. Natuurlijk spreken we slechts Esperanto. Als we dit niet deden, zouden de leden nooit goede esperantisten worden.
4. Om ongeveer kwart over acht opent de conversatieleider de vergadering.
5. Meestal leest hij dan enkele mededelingen voor, nieuws over cursussen, propaganda, uitstapjes, enz.
6. Vaak moet hij de leden er aan herinneren ,dat er voor de pauze niet mag worden gerookt.
7. Daarna geeft hij gewoonlijk het woord aan een van de leden, die zich voor een spreekbeurt heeft opgegeven.
8. De spreker zorgt altijd voor een leerzaam onderwerp; nu eens behandelt hij een lezenswaardig boek, dan weer spreekt hij over de beweging, geschiedenis of propaganda van Esperanto.
9. Om negen uur begint de pauze. Er wordt een kopje koffie gedronken en zoveel mogelijk gesproken.
10. De pauze duurt een kwartier. Na de pauze probeert men vaak de beginners aan het spreken te krijgen door het stellen van vragen.
11. Zulke oefeningen zijn beslist nodig, opdat ook de nieuwelingen spoedig vloeiend kunnen spreken.
12. Bij het beantwoorden der vragen vergissen zij zich wel eens of kunnen zich het een of andere woord niet meer herinneren.
13. De leider maakt hen dan attent op gemaakte fouten of laat een ander zijn vraag nog eens beantwoorden.
14. Het merendeel der leden houdt van zingen; daarom wordt er vaak gezongen. Zingend oefenen de leden zich in de uitspraak.
15. Gewoonlijk eindigt de conversatieavond om half elf. Langzamerhand verlaten allen tevreden de zaal.

Vertaling van opgave 4.

Iu montris 1) al mi la vojon. Vidu 2), iu staras antaŭ la pordo. Kiu ankoraŭ venus 3) tiom malfrue? Mi atendas neniun. Kie estas la libroj, kiujn 4) mi pruntedonis al vi? Estas agrable 5), paroli pri temo 6), kiun oni tute regas 7). Ne legu tiajn 8) librojn, kiaj estas tiel malbone 9) verkitaj 10). Ĉiuj, kiuj konas lin, laŭdas lian konduton. Ĉiu, kiu parolas Esperanton, havas eksterlandajn amikojn. La domo, kiun ni ĵus preterpasis 11), estas konstruita antaŭ nelonge 12). Tiun libron mi ankoraŭ ne legis; ĉu ĝi estas bela 13)?

1) Ook: *indikis, sciigis.* 2) Ook: *jen, rigardu.* 3) Niet: *venas;* ook bij twijfel of onzekerheid gebruikt men de voorwaardelijke wijs. 4) Niet zonder N; hier is sprake van twee volzinnen: „kie estas la libroj" en „kiujn mi pruntedonis al vi"; men ontlede deze laatste zin eens goed. 5) Niet: *agrabla;* dit is een onpersoonlijke zin, d.w.z. dat deze zin geen onderwerp heeft. Men vergelijke: *Tio estas bona (agrabla, necesa,* enz.) maar: *Estas bone (agrable, necese,* enz.). 6) Ook: *subjekto;* hoewel men dit woord meestal alleen gebruikt bij het ontleden van een zin als vertaling voor „onderwerp". Niet: *projekto;* d.i. ontwerp. 7) Juister dan: *scipovas, konas.* 8) Ook: *tiujn, kiuj;* de Nederlandse zin laat ruimte voor twee betekenissen. Niet: *tiajn, kiuj.* 9) Niet: *klare;* d.i. duidelijk. 10) Niet: *skribitaj;* het Nederl. woord „schrijven" heeft twee betekenissen, n.l. het schrijven met de hand en het schrijven van een boek, artikel, enz., geestelijke arbeid dus. Het eerste begrip wordt vertaald met „skribi" het tweede met „verki". 11) Niet: *pasis;* „*pasi*" is een onovergankelijk werkwoord, met een voorzetsel als voorvoegsel gebruikt, wordt dit werkwoord overgankelijk. Niet: *paŝis;* d.i. stappen. 12) Ook: *freŝdate, ĵus,* dit laatste woordje is zeer juist, maar niet gebruikt, omdat het reeds

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen
Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 6. Vertaal in Esperanto:
Het Christendom plaatste zich niet naast, maar tegenover alle andere godsdiensten. Het predikte geen nieuwe God, maar de enige, ware God, naast wie de andere goden niet bestaan. Het verkondigde de ongeziene God, die zich in Christus aan de wereld had geopenbaard, de enige schepper en onderhouder van het heelal, die de God der Liefde en de Hemelse Vader der mensen is. Reeds de Joden hadden hun Jahve voor de enige ware God gehouden, naast wie geen andere kunnen bestaan. Daarom ook was men afkerig geweest van hen. Die afkeer ging nu over op de Christenen; die afkeer werd haat, nu de Christenen bleken veel talrijker en machtiger te zijn dan de Joden, nu zij meer en meer alle standen der samenleving begonnen te doordringen. Het kon wel niet anders of de Romeinse staat moest zich wel met zijn scherpste wapenen verzetten tegen het nieuwe geloof.
H. BRUGMANS. „De middeleeuwen". Examen F.L.E., 3 Dec. 1933.

Vertaling van opgave 4
NIA INSTRUADO
Nia instruado troviĝas en plorinda stato 1). La milito detruis 251 lernejojn kun 1702 ĉambroj 2); en Rotterdam 3) ruiniĝis 4) en unu 5) katastrofa tago 47 lernejoj kun 309 ejoj. Kaj de post la liberiĝo eĉ ne unu oni rekonstruis (julio 1947a). Kia estos la stato en 1952a, kiam la 50 %a (kvindekprocenta) naskokresko 6) petos eniron 7) en la lernejojn?
La granda manko 8) pri (ge)instruistoj kreskos en la proksima estonta tempo ĝis malkvietiga 9) alt(ec)o. Ĉe la konservado 10) de la nuntempa meza nombro da lernantoj (34,4) oni bezonos de 1946a ĝis enkluzive 1952a ne malpli ol 15.900 novajn (ge)instruistojn dum kiam la maksimuma povo 11) de la seminarioj estas 2000. Ĉi tiuj do 12) povos liveri 13) dum tiuj ses jaroj maksimume 14) 12.000 kandidatojn. Sekve pligrandiĝo de la ekzistanta manko per 3.900!
(Het Schoolblad)

1. Ook: *situacio.* 2) Ook: *ejoj, salonoj, klasoĉambroj, klasejoj.* 3) Bij vertaling schrijft men slechts één „t". 4) Ook: *rubiĝis.* 5) Omdat „ĕén" geldt als telwoord, wordt het hier ook vertaald. 6) Ook: *naskiĝoprogreso.* 7) Ook: *allason, enirpermeson, akcepton.* 8) Ook: *nesufiĉo.* 9) Ook: *malkvieton naskanta.* 10) Ook: *subtenado.* Niet: *sinteno.* 11) Ook: *kapablo, kapacito.* 12) Ook: *sekve.* 13) Ook: *pretigi, fininstrui.* 14) Ook: *ne pli ol.*

Beoordeling:
E.R.-M. te S. 7; Zeist; (sen nomindiko) 6; L.B.-B. te W. 8; Y.V. te 's-Gr. 6; G.C. de G. te U. 6; C.J.P. te Z. 6; F.v.d.M. te U. 7; J.R. te A. 9; F.B.R. te A. 8; Lernanto 7; A.J.G. te D. 6; J.J.B. te D. 6; Kortbirdo 7; J.F.v.D. te A. 8; D.K. te Z. 8; K.S. te Z. 6; G.A. te R. 8; D.V. te H. 7; Astor 8; M.K. te Z. 7; J.F.D. te L. 8; E.A.B. te A. 9.

ONZE EIGEN STUDIE-UITGAVEN

Onmisbaar voor vervolgcursussen was het boekje „Post la kurso". Helaas, *was!* Het is uitverkocht, en hoewel onze Libroservo het ongetwijfeld weer zal uitgeven, moeten we het voorlopig zonder dit practische boekje stellen.
En nu dus onze vervolgcursussen maar zonder leerboekje? Welneen! Weet u, dat de Libroservo nog over een aantal gebonden jaargangen van „La Progresanto" '46 en '47 beschikt? De nieuwe leden zijn zeker niet in het bezit daarvan. Welnu, benut dit studiemateriaal voor uw vervolgcursussen. Het zal u zeker voldoen. De prijs is f 1.75.

---

in de zin voorkomt. Niet: *novakonstruita.* 13) Ook: *leginda.*

Beoordeling:
E.A.B. te A. 10, Astor 9, O.K. 9, G.A. te R. 10, K.S. te Z. 8, D.K. te Z. 8, Tilio 8, J.F.v.D. te A. 9, J.F.D. te L. 8, Sen nomo te Z. 8, G.B.N. te Z. 10, A.A.D. te Z. 8, J.J.ter H. te D. 9, P.W. te Z. 8, J.J.B. te D. 9, A.J.G. te D. 9, ER.M. te S. 9, J.A.V. te U. 9, A.P. te A. 9, S.K. te R. 6, R.J.deG. te G. 7.

Jac. Lem

Wij zitten op zwart zaad
Een werkkring aanbieden
Om je eerlijk de waarheid te zeggen
Net
Hellingopwaarts
Om de tuin leiden
In de gaten hebben
Te klagen hebben
Op het volgende neerkomen
Wat in zijn vermogen is
Iemand op zijn gemak zetten
Met inspanning van alle krachten
Ons levenspad gaat niet altijd over rozen
Zich schriftelijk aanmelden
Iemand aan zijn lot overlaten
In diepe slaap verzonken
Bedrijf
Een afwachtende houding aannemen
Iemands geheugen opfrissen
Een kans bieden

Ni sursabliĝis
Oferti funkcion
Por paroli tute sincere
Bonkonduta
Deklivosupren
Mistifiki
Rimarki
Havi plendmotivon
Esti esence la jena
Kion li kapablas
Sentigi iun hejme
Streĉante ĉiujn fortojn
La vojoj de nia vivo ne ĉiam kondukas tra florĝardenoj
Proponi sin letere
Sin ne plu interesi pri iu
Droninta en profunda dormo
Uzino
Alpreni atendan sintenon
Elskui al iu la memoron
Oferti ŝancon

Opgave 5

1. Hetgeen hij zeide kwam op het volgende neer: Ik zal je nog één kans bieden. Grijp die (*ĝin*). Als je dat niet doet, laat ik je aan je lot over. 2. Je weet toch nog wel wat ik je onlangs heb gezegd, of is het nodig. dat ik je geheugen nog eens opfris? 3. Beste vriend, ons levenspad gaat niet altijd over rozen. Troost je met de gedachte, dat ieder op zijn beurt moeilijkheden heeft te (vert.: *moet*) overwinnen. 4. Met inspanning van alle krachten slaagden de schipbreukelingen er eindelijk in de kust te bereiken. 5. Je moet niet trachten mij om de tuin te leiden, want om je eerlijk de waarheid te zeggen, geloof ik weinig van hetgeen je mij vertelde. 6. Ik had in de gaten, dat de jongen erg zenuwachtig was; daarom stelde ik hem met enige vriendelijke woorden op zijn gemak. 7. Over gebrek aan medewerking hebben wij niet te klagen. Ieder doet wat in zijn vermogen is. Wat ons ontbreekt zijn de nodige geldmiddelen. Laat ik het (maar) ronduit zeggen: Wij zitten op zwart zaad. 8. Wij beschikken te weinig over deugdelijke bewijzen om ons een oordeel (*opinio*) te kunnen vormen over het gebeurde. Daarom namen wij een afwachtende houding aan. 9. Wij vragen nette meisjes en bieden een aangename werkkring. Men melde zich schriftelijk aan bij de directie van ons bedrijf. 1. Na een lange en vermoeiende tocht (*promeno*) hellingopwaarts, bereikten wij de hut. Na gegeten te hebben, legden wij ons ter ruste en spoedig waren wij in diepe slaap verzonken.

Vertaling van opgave 4

1. Aro da arbedoj malvidigis ŝin, tiel ke ŝi ĉion povis subaŭskulti (kaŝaŭskulti). Ŝi streĉis la aŭdon por ne perdi (por ke ŝi ne perdu) unu vorton kaj tiel (tiamaniere) ŝi sciiĝis pri la intencoj de la konspirantoj. 2. Per vervaj vortoj li skizis la progresojn de la teĥniko, sed li ne forgesis ankaŭ atentigi pri la danĝero, ke povos okazi, ke finfine ne la homo estros la teĥnikon, sed la teĥniko la homon. 3. Ĉu vi konas fraŭlinon A.? Estas malagrablaj onidiroj rilate al ŝi. Mi volonte scius kio estas vera kaj kio estas nevera. 4. Diru al mi kio premas al vi la koron; eble mi povos helpi vin. Per iom da bonvolo kaj energio multe da obstakloj povas esti forigataj. 5. Viaj evitaj respondoj ne povas kontentigi min. Se mi rilatigas viajn vortojn kun viaj agoj, mi konkludiĝas, ke vi estas hipokritulo. 6. Granda estis la kuraĝo kaj admirinda la sinoferemo de tiuj, kiuj falis (pereis) por nia libereco. 7. Ĉi tiuj ĉambroj estis alireblaj nur por kelke da privilegiuloj. Ĉiuj aliuloj estis severe neallasataj. 8. Ĝojkrianta amaso ĉeestis je ilia reveno. Kun multe da peno (penege) la polico sukcesis malobstrukci por ili la vojon. 9. Fordibocinte (Post kiam

KIO OKAZIS ANTAŬ 1949?

Jarkroniko pri la Esperanto-movado.

G. P. de Bruin.
(Daŭrigo)

EL DIVERSAJ LANDOJ.
Bedaŭrinde ĉi tiu parto de nia kroniko estas tute ne kompleta. Ni ne scias la adresojn de ĉiuj associoj; kaj el la asocioj al kiuj ni sendis cirkulereton, nur kelkaj respondis. Iuj bonvolis sendi numero(j)n de sia organo, sed ne ĉiam ni trovis en ĝi (ili) uzeblajn informojn. Nia ĉefa demando koncernis la membronombron, sed pri tio preskaŭ ĉiuj respondintoj silentis. Kial do? Ĉu per tio oni servas la intereson de la movado? Niaopinie ĉiu asocio devus ĉiujare publikigi en sia organo jarraporton kun la membronombro. Per tio ebliĝus konstati i.a., ĉu la movado kreskas aŭ ne, kaj tio utilus pli ol la raportoj pri novaj kursoj kun la nombro da ekpartoprenantoj! Espereble nia venontjara kroniko estos pli kompleta, kaj ni nun jam alvokas por ĝi ĉies kunlaboron.

En Argentino aperis biografio pri d-ro Zamenhof en formo de romano. Aŭtoro: A. Lopez Luna. Samideano D. Quarello komencis la eldonadon de serio da verketoj prigramatikaj sub la titolo *„Lernu Esperanton"*.

„Aŭstria Esperanto-Federacio" (organo *„Aŭstria Esperantisto-Revuo")*, kiu kunigas diversajn tendencojn de nia movado, kongresis en Graz. Kvarcent partoprenantoj, inter kiuj 41 eksterlandanoj. Oficiala akcepto kaj inaŭguro de Esperanto-Placo Subvencioj: ŝ. 3000 de la landa registaro, ŝ. 2000 de la urbo Graz, ŝ. 15 de la Laborista Ĉambro, ŝ. 1330 de la Fremdultrafika Oficejo (preskostoj de gvidlibro).

Belgio havas du landajn organizojn: „Reĝa Belga Ligo Esperantista" kaj „Flandra Ligo Esperantista", kies organoj estas respektive *„Belga Esperantisto"* (dumonata) kaj *„Flandra Esperantisto"* (monata). Pri „Belga Ligo" mankas membrociferoj: ĝian kongreson en Brugge ĉeestis cento da membroj. Fl.L.E. kreskis je du sekcioj kaj atingis la membronombron 398. Krome oni varbis 387 simpatiantojn kiel „amikojn". Radiostacio Gent elsendis je Zamenhoftago propagandan teatraĵon.

Pri Bulgario mankas konkretaj faktoj. *„Internacia Kulturo"* daŭre aperis, kvankam kun granda malfruiĝo, sed kiel per-esperanta gazeto ne multe informis pri la movado. Oni anoncis la 32an Bulgaran Esperanto-Kongreson, sed raporton ni ne vidis. Esperantista brigado laboris ĉe la konstruo de la junularurbo Dimitrovgrad kaj estis honore menciata.

En Belo Horizonte, ĉefurbo de la ŝtato Minas Gerais (Brazilo), okazis la 12a Brazila Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis proks. 300 personoj. La ŝtatestro de Minas Gerais ĉeestis kaj faris parolandon pri niaj lingvo kaj movado. Al li oni ŝuldas ankaŭ subvencion de 30.000 kruzeroj (6000 guldenoj). Saman subvencion donis la urbo, dank' al subteno de la urbestro. Sur Placo Esperanto oni metis fundamentan ŝtonon por starigota momumento honore al d-ro Zamenhof. Gazetaro, radio kaj filmo montris grandan interesiĝon por la kongreso. (Daŭrigota)

---

li fordibocis) ĉiujn siajn posedaĵojn, li staris tute sola kaj senhoma en la mondo. Neniu el liaj iamaj (antaŭaj, eks-) amikoj sin interesis pri li. Cent amikoj en mizero havas pezon de funtero. 10. Klopodu inklinigi lin iri kun ni. Li konas tiujn ĉirkaŭaĵojn kaj multe scias pri la naturo. Ni havos en li bonan gvidanton.

Beoordeling:
Astor 8; K.S. en Z. 6; D.K. en Z. 8; D.V. en H. 7; M.J.K. en Z. 8; E.A.B. en A. 8; E.R.-M. en S. 7; J.J.B. en D. 6; A.J.G. en D. 6; J.A.V. en U. 4; D.P. en A. 7; Tilio en A. 5; L.B.-B. en W. 9; J.F.v.D. en A. 9; J.F.D. en L. 7; G.A. en R. 7.

Bonvolu korekti: paĝo 36a, unua kolono, 3a linio de supre: *Moederziel alleen* d.e. *Moederziel alleen en verlaten.* Sur la sama paĝo, dua kolono, 7a linio de malsupre: *muŝo* d.e. *muso.*

BIBLIOGRAFIO

MAŜINOJ, MONO KAJ MONDPACO. de C. Marshall Hattersley laŭ la peto de La Socikredita Kunordiga Centro, England. 60 Paĝa.

Per ĉi tiu libreto oni celas diskonigi sociekonomian idearon, origine proponitan en 1919a de skota inĝeniero C. H. Douglas.
En la unuaj ĉapitroj la verkintoj en konduke instruas pri industriaj, ekonomiaj kaj sociaj aferoj. Detale li priskribas la kaŭzojn de diversaj sociaj problemoj. Poste li reliefigis la esence absurdan veron, ke pro la civilizado grandiĝas mizero. Pro la teĥnikaj progresoj la kvanto da libera tempo kreskas, kaj tiuj, kiuj disponas pri tiu tempo, devas pro tio perdi la rimedojn por ĝui ĝin.
Socikreditanoj asertas, ke estas malakorde kaj sensence anstataŭigi homan laboron per suna aŭ atoma energio kaj samtempe konservi industrian kaj financan organizaĵon, kies bazo estas la supozo, ke la laborado estas la sola rajtigilo por akiri varojn. La liberiĝo de la homaro el la ekonomia devigo laboradi estas unu el la signoj de ekonomia progreso.

Koncerne la lingvon ni atentigu, ke scienca verko respondu al tute aliaj kondiĉoj ol beletristikaĵo. En la lasta, verkanto strebu al beleco de formoj, frapeco de metaforoj kaj ĝusta apliko de sinonimoj.
La lingvo en scienca verko respondu unualoke al klareco, ĝi ekskluzivu la plej malgrandan miskomprenon. La aŭtoro de la koncerna verko laŭdinde sukcesis en tio kaj prezentas al ni la verketon en flua, korekta lingvo. Per ĝusta uzado de afiksoj li evitis neologismojn, tiel kontribuante al simpleco. Atentinda estas la uzo de la neoficiala sufikso „end", kiu montriĝas preciziga. Malgraŭ la klara lingvo ne mankas kelkaj interesaj esprimoj. P. 6. *Orgio de reciproka detruado.* Een orgie van wederzijdse vernietiging (Milito). P. 7. *Vendi subkoste.* Onder inkoopsprijs verkopen. P. 49. *Porciumaj aranĝoj.* Bonnenstelsel. P. 49. *Porciumaj kartoj.* Bonkaarten.
Kritikindaĵoj preskaŭ tute mankas. Nekonsekvenca estas la uzo de jen „tekniko" jen „meĥaniko". Pri kelkaj gramatikaĵoj, ĝenerale konsideataj eraraj aŭ dubindaj, la verkinto konigas sian opinion, ekz.: *altenira* (suprenira), *tien kaj reen* (returne), *memdisciplino* (sindisciplino), p. 16. *Oni ne supozu, ke la produktado de manĝaĵoj povos daŭri, krom* (escepte) *se la homoj donos pli ol meĥanikan atenton al....*
Kiu interesiĝas pri sociekonomio legu ĉi tiujn interesajn studojn, kiuj ankaŭ laŭ lingva vidpunkto estas rekomendindaj. H. Kuijt.

KOREKTO

Sur paĝo 40a de la maja numro forfalis la titolo de la recenzita libreto. Ĝi estas MALSATO EN RIĈA RIKOLTO.

ANKORAŬ

Kelkfoje oni dubas pri la loko de „ankoraŭ" en la frazo. Ĝenerale oni metas adverbon, kiu povas rilati al pli ol unu vorto en la frazo, antaŭ tiu vorto, al kiu ĝi rilatas. Per tio ni evitas miskomprenon. Oni metis al nia prijuĝo la frazon „Bij het station stond nog een oude koets". „Nog" rilatas al „oud", tamen ne en tiu senco, ke la kaleŝo estis ankoraŭ malmoderna, sed ke tiu malmoderna objekto ĝisvivis la modernan tempon, restante kompreneble *ankoraŭ* malmoderna. Oni do traduku: *Ĉe la stacidomo staris ankoraŭ malmoderna kaleŝo.*
Por esprimi delikatajn diferencojn oni nepre serĉu la ĝustan lokon por „ankoraŭ", enz. en:
Li ankoraŭ aĉetis novan biciklon (li jam havis novan kaj aĉetis duan).
Li aĉetis ankoraŭ novan biciklon (tiu ĉi frazo povas enhavi du signifojn; por eviti miskomprenon, oni povas transformi ĝin jene:
Li aĉetis biciklon ankoraŭ novan (li aĉetis biciklon, kiu estis ankoraŭ nova).
Li aĉetis biciklon novan ankoraŭ (eble li jam havas malnovan).
Oni tamen konsideru, ke kiom ajn precize oni klopodas esprimi sian penson, ĉiam restas la eblo, ke leganto perceptas ĝin alie. Ofte la kunteksto klarigas. Kaj en parolo multe helpas la akcento sur unu el la vortoj.
Oni rimarku, ke Esperanto ne havas devigajn regulojn pri la loko de la vortoj en la frazo, sed ke la ĝusta lokado rezultas el praktikaj spertoj.

DE WERKWOORDEN

G. J. D.

DE ONBEPAALDE TIJD

(Nedifinita tempo)

Door dit hoofdstukje van onze artikelenreeks „De Werkwoorden" reeds nu te plaatsen, lopen wij eigenlijk op de geregelde volgorde der te behandelen onderwerpen vooruit. Wij hebben hiertoe evenwel besloten om aan de wensen van enige lezers tegemoet te komen, naar aanleiding van onze opmerkingen over de onbepaalde tijd een vorig nummer.

Wij zijn gewoon de tijden der werkwoorden te onderscheiden in tegenwoordige, verleden en toekomende tijd. Dat de *vorm* dier tijden niet altijd de *werkelijkheid* dekt, is ons wel bekend. Zo zegt men in het Nederlands gerust: *ik kom morgen*, hoewel we heel goed weten, dat „kom" tegenwoordig en „morgen" toekomend is. In Esperanto moet men zich evenwel strikt aan de juiste tijdvorm houden en vertalen: *mi venos morgaŭ*.

Toch gebruiken we ook in Esperanto een tijdvorm die niet geheel op zijn plaats is, doordat we een eigen vorm daarvoor in onze taal missen. Op dit punt is Esperanto echter niet armer dan de moderne talen, waarin die vorm eveneens ontbreekt.

Wij bedoelen de onbepaalde tijd. Men spreekt n.l. dikwijls van een handeling, die niet aan een bepaalde tijd gebonden is, dus onbepaald is. En daarvoor bezigen wij de tegenwoordige tijd, zonder er ons van bewust te zijn, dat de bedoelde handeling niet aan het tegenwoordige is gebonden, maar ook in het verleden en in de toekomst plaats vindt, dus algemeen of onbepaald is.

Als we iemand een sigaar willen presenteren, vragen we wel 'ns beleefd: „Rookt u?" Welnu, als dit tegenwoordige tijd betekende, zou onze vraag geen zin hebben, want iemand die rookt, behoeven we geen sigaar te presenteren. De bedoeling is echter: bent u gewoon te roken? Het roken heeft dus helemaal niet plaats; en onze vraag bedoelt alleen te weten te komen, of die persoon de gewoonte heeft te roken. Nu, dit is de onbepaalde tijd. Eigenlijk is het helemaal geen tijd, maar de zin met zo'n werkwoord betreft, juister gezegd, de gewoonte of eigenschap van iemand of iets.

Iemands gewoonte of eigenschap kan min of meer regelmatig tot uiting komen, bijv. in: *hij rookt; wij lezen veel boeken; hij spreekt vlot; die jas staat u prachtig; zij eet geen andijvie*, maar kan ook tot een zekere tijd beperkt zijn, zonder daardoor bepaald te worden, bijv.: *'s winters stookt men de kachel; de laatste tijd slaap ik slecht; 's Zondags gaan zij naar de kerk; hij rookt nooit onder het werk.*

In vele gevallen drukt men die gewoonte of eigenschap uit in een afzonderlijk werkwoord: *hij placht te zeggen....; hij is gewoon te lezen.*

In Esperanto doen wij precies hetzelfde. In verouderde leerboekjes werd wel 'ns gezegd, dat een zin als „hij rookt" met die algemene betekenis vertaald behoort te worden met „li fumadas", maar dat is onjuist. In alle gevallen vertalen wij de onbepaalde tijd eenvoudig met de tegenwoordige tijd, dus: *li fumas*. En evenals in het Nederlands kan men, als het gewenst voorkomt, zeggen: *li kutimas fumi; li emas paroli*, zelfs: *li ŝatas labori.*

Ook werkingen die in een absolute waarheid vervat zijn, vallen onder de onbepaalde tijd, die daarom wel eens „eterna tempo" genoemd wordt. Enkele voorbeelden maken dit volkomen duidelijk: *water kookt bij 100 graden; de leugen is in strijd met de waarheid; tweemaal twee is vier.* Ook de werkingen in spreekwoorden, spreuken e.d. kan men hieronder schikken, alhoewel die gezegden natuurlijk dikwijls maar betrekkelijk of ten dele waar zijn, dus niet absoluut, zoals: *liefde overwint alles; van uitstel komt afstel; komt tijd, komt raad.*

Men ziet, dat de z.g. onbepaalde tijd in Esperanto geen enkele moeilijkheid oplevert. Men vertaalt eenvoudig de tijd die in het Nederlands is gebruikt, dus de tegenwoordige.

Het spreekt vanzelf, dat behalve de bedrijvende vormen *(-as, estas -anta, -inta, -onta)* en de lijdende *(estas -ata, -ita, -ota)*, ook de z.g. mediale vorm (met *-iĝas)* voor de onbepaalde tijd gebruikt wordt: *niaj kunvenoj komenciĝas je la oka horo; vintre la vesperoj komenciĝas frue.*

Maar met de uitgang „iĝi" raken we een geval, dat voor sommigen blijkbaar een bezwaar oplevert. We denken aan het zinnetje „dit boek leest gemakkelijk." Men bedenke hierbij, dat ook hier van geen bepaalde tijd sprake is, maar dat dit boek een eigenschap bezit, waardoor het gemakkelijk gelezen wordt. Zou men met een lijdende vorm vertalen: *tiu ĉi libro estas facile legata*, dan voelt men, dat het gemak aan de kant van de lezer is en niet zozeer de eigenschap van het boek noemt. Ook de vertaling *estas facile*

OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

Nia artikolo „La gramatikaj personoj" en la aprila numero ne kontentigis s-ron De Hoog. Bedaŭrinde la spaco en L.P. ne permesas publikigi lian detalan respondon kun kontraŭargumentoj, kiu krome devigus nin rerespondi denove detale. Ĉar s-ro De Hoog mem konsentas, ke tiom grava la afero cetere ne estas, ni preferas ne reveni al ĝi detale por ne enuigi la legantojn per bagatelo. Sufiĉu nur, ke ni mencias la jenon:

S-ro d. H. kritikas la rilatojn inter la diversaj ekzemploj, per kiuj ni klopodis argumenti la korektecon de „sia" en „vi, kiu.... sian...." Sed.... ni ne akcentis tiujn rilatojn; ni celis nur pruvi per diversaj ekzemploj, ke praktike oni ofte uzas la trian gramatikan personon por la unua aŭ dua persono reale.

S-ro d. H. konsentas, ke „en Esperanto ni *povus* permesi al ni la lukson:

a. „Do estas vi kiu forgesis sian ombrelon!" (indentiga: do vi estas la persono, kiu forgesis sian pluvombrelon).

b. „Estas *vi* kiu forgesis *vian* ombrelon" (emfaza: *vi* do forgesis vian...)"

Tion ni akceptas, sed ne lian konkludon: „Frazo a. do neniel pruvas, ke „kiu" post „vi" estas triapersona, sed nur ke „sia" *estus* aplikebla por esprimi specialan nuancon", ĉar uzo de „via" ne pruvas nekorektecon de „sia", sed se oni jam konsentas pri aplikeblo de „sia", tio signifas, ke „sia" rilatas al triapersona subjekto. Kaj tiu subjekto en „vi, kiu" estas „kiu", do triapersona.

La temon ni finu per opiniesprimo de kompetenta gramatikisto, s-ro Butler: „Mi tre sincere gratulas vin pri via artikolo „La gramatikaj personoj". Al mi ŝajnas, ke vi majstre pritaktis la problemon".

NEOLOGISMOJ

Neologismoj ĉerpitaj al literaturaj eldonoj de F.L.E.

„KULIO", M. H. Székely-Lulofs (Daŭrigo)

pteropo — granda vesperto (vliegende hond, Pteropus edulis)
rizoforo — arbo kreskanta sur marĉa kaj malsaniga grundo (rhizophoor, Rhizophorus)
robusta — fortikstatura (robuust)
roseolo — ekzantema haŭtmalsano
sado — durada veturilo tirata de homo (sado)
savaho — rizejo (sawah)
siriho — maĉajo el betlofolio, iom da betlo, kalko kaj specaĵoj (sirih)
soldateska — soldatmaniera (soldatesk)
strodjo — cigaredo en folistrio anstataŭ papero (strootje)
sundanoj — malaja gento en okcidenta Javo (Soendanezen)
tektono — arbo, kiu liveras tre malmolan lignon (teakhoutboom, Tectona grandis)
toktoki — kokokrii (kakelen)

„JUDOJ SEN MONO", M. Gold

aha — interjekcio espimanta agrablan miron, kontenton, triumfon (aha)
aĥ — interjekcio esprimanta bedaŭron (ach)
beng — onomatopeo esprimanta sonon de falanta objekto
blekĝeko — bastono aŭ fortika ŝnuro kun plumba fino (ploertendoder)
blinco — maldika, krispa patkuko, faldita sur fromaĝo aŭ konfitaĵo
bubona plago — febra ŝvelaĵo en la ingveno, kaŭzita de ensorbita infekta materio

(Daŭrigota)

---

legebla drukt niet de gewenste betekenis uit. Vandaar, dat men vanzelf komt op de enige bevredigende vorm: *tiu ĉi libro facile legiĝas.*

Naar dit voorbeeld zijn ook de volgende zinnen volkomen in orde: *tiu razilo tiriĝas; mono facile elspeziĝas.* Men denkt er dus minder aan, dat eigenlijk die werkingen door mensen plaatsgrijpen, maar eerder of alleen aan het gebeuren zelf, alsof het voorwerp: *la razilo, la mono* een werking verricht.

Dit moet ons echter niet verleiden vele lijdende vormen kortweg met „iĝi" te vertalen. Zo zijn bijv. foutief: *li elektiĝis prezidanto; li nomiĝis direktoro,* want die personen hebben een daad *(elekti, nomi)* ondergaan, die alleen met *esti-ita* vertaald kan worden. Bovendien hebben deze feiten niets gemeen met wat we hierboven onder de onbepaalde tijd hebben uiteengezet.